

HIERAŬ MI

(Lennon/Mc Cartney)

Esperantigo: E. Rovere

Havis mi
la feliĉon hieraŭ tie-ĉi,
vivo brilis kiel sunradi',
hodiaŭ okazis tragedi'
Ĉiam mi
Trovis helpon de l' ĉiopova Di' .
Ĉu mi perdis gracon nun de Li ,
ĉar kun mi plu ne estas ŝi.
Kial ŝi forlasis min sen antaŭprepar' ?
Venas al mi timoj pri ebla mia erar' .
Ambaŭ ni
amis reciproke kun pasi'.
Ekas nun de amo l'agoni' ,
Temp' de priplor' kaj nostalgi' .
Kiel povas revoj cindriĝi dum moment' ?
Eble amo ne povas daŭri sen turment' .
Ŝajnas mi
disbatita de la vent' foli'.
Akompanos min ĉi emoci' :
profunde amis hieraŭ mi.
Se por ni
estis am' facila lud' , poezi',
komenciĝas ĝia agoni',
temp' de priplor'
kaj nostalgi'.
Kiel povas revoj cindriĝi dum moment' ?
Eble amo ne povas daŭri sen turment'.
Ŝajnas mi dsibatita de la vent' foli'.
Akompanos min ĉi emoci'.
Profunde amis hieraŭ mi.
En amo kredis hieraŭ mi.